



# OOMOTO

## INTERNACIA

Monata organo de la UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

Sidejo : 49, rue Boulard, PARIS (14<sup>e</sup>) Telegrafa adreso : EUROPOMOTO-PARIS

Jarabono por Francujo : 15 fr. fr.

Redaktoro : K. NIŠIMURA

Jarabono por aliaj landoj : 3 sv. fr.

☆ Poŝtmandatoj devas esti sendataj al la persona nomo de la redaktoro. ☆

## JAPANUJO

*Ni publikigas ĉi sube artikolon de nia kunlaboranto J. V. por montri la privatatan opinionon de unu Eŭropano.*

La eŭropa publiko bone scias hodiaŭ, ke Japanujo estas potenca ŝtato, sed oni ĝenerale emas kredi, ke ĝi estas tiel malproksima, ke direkta influo de ĝi ne estas konsiderebla. Tial oni al kutimigis juĝi la okazajn en Japanujo kaj Ĥinujo simile al ŝakludo. Tiu ĉi kondukmaniero estas erara. Ni neniam devas forgesi, ke en nia epoko la distanco ludas ne gravan rolon, kaj konflikto, kiu naskiĝas en iu malproksima parto de la terĝlobo povas facile lumigi brulegon, kiu detruos malproksimajn terpartojn. La kaŭzo de la politikaj konfliktoj estas preskaŭ ĉiam ekonomia: la militaristoj maskas tiujn ĉi kaŭzojn per naciaj-ŝovinistaj kaj per rasaj konsideroj, kiuj per tio gajnas konsiderindan gravecon. Por determini la lokon de Japanujo inter la grandpotencoj, ni do devas speciale okupiĝi pri la ekonomiaj kaj pri la rasajnaciaj problemoj.

Depost la antikveco regadis en Japanujo 224 imperiestraj generacioj.

Estis tempo, kiam la centra povo de la imperiestroj estis nur simbola kaj la efektivaĵo regantoj estis la multnombraj feŭdalaj sinjoroj. Dum la lasta periodo de la japana historio la grandsinjoroj interkonsente remetis la tutan centran povon al la imperiestro kaj tiu ĉi fakto sole ebligis la grandstilan renaskiĝon de la japana popolo. Dum la regado de la antaŭlasta imperiestro nomita Meiji, elvenis la fama dekreto, kiu malfermis la pordegojn de la Imperio al la okcidenta civilizacio. La tielnomita periodo de Meiji estas grandioza supreniro de la Japana Insullando en la vicojn de la mondaj grandpotencoj. Dum nur tridek jaroj Japanujo fariĝis kulturita kaj civilizita lando, forigis la eksterlandajn koncesiojn kaj konkiris sian plenan sendependecon.

Nun ni faru mallongan parentezon. La nuntempa Ĥinujo postulas ankaŭ la forigon de

la eksterlandaj koncesioj; ĝi esperas tion atingi per burĝa milito, per armila rezisto kaj per aŭliko de la eŭropaj daktrinaj pri egalrajteco de la popoloj. La kompatindaj Ĥinoj devus kompreni, ke el tio povas rezulti sukceso nur se ili estas apogitaj de la materia forto. Japanujo tion komprenis kaj tial ĝi liberigis. Kontraŭ la armiloj de la okcidenta civilizacio, Japanujo turnis similajn armilojn, kaj ĝi venkis.


La unua fazo de la Ĥistorio de Japanujo estas tiu de la angla amikeco. La angla kunlaborado daŭris de la jaro 1902 ĝis 1921. Dum tiu ĉi periodo okazis komunaj maraj ekzercoj de la

hodiaŭ estas sentebla en la lando malamikeco rilate al « malfidela » Britujo.

La Ĥinaj revolucioj, kiujn japanaj trupoj partoprenis kun la eŭropaj soldatoj sub la gvido de germana generalo. La subpremo de la revolucio nomita « Boxer » donis al Japanujo iom da materia avantaĝo, sed ĝi ĉiokaze multe malutilis al ĝi, lasante ne facile forgesblan malamikan senton en la animo de Ĥinoj.

La rilatoj inter Japanujo kaj Usono ankaŭ pli kaj pli malboniĝis. En la antaŭmilita periodo elmigrantoj de ĉiuj mondpartoj svarmis al Usono, kies pordejoj estis larĝe malfermitaj al ĉiuj venintoj. En Japanujo ĉiujare estas 800.000 naskiĝoj pli ol mortoj kaj la problemoj de la elmigrado estas unu el la plej gravaj problemoj de la registaro. Estis do tute natura afero, ke japanaj elmigrantoj veturadis al Ameriko. Tamen, jam depost la jaro 1905, kiam ĉiuj landanoj povis libere eniri Amerikon, kreiĝis movado en Usono kiu celis malpermesi al japanoj la enmigradon. La « Kontraŭaziana Ligo » venenigis la publikan opinionon de la iam liberala Usono. La saman jaron la Washingtona Parlamento akceptis leĝproponon, kiu malpermesas akcepton de japanaj infanoj en la amerikaj lernejoj. En januaro de la jaro 1913 la sola ŝtato Kalifornio voĉdonis 40 kontraŭjapanajn

leĝojn. Japanujo devis promesi ne plu sendi enmigrintojn kaj la paco estis konservata. La politiko de la japana registaro estis gvidata dum la lastaj jardekoj de la elmigrada problemoj. Post la fermo de la amerikaj landlimoj, la japana registaro pensis pri Aŭstralio, lando, kiu bezonas agrikulturan enmigradon. Malfeliĉe rasaj konsideroj ankaŭ tie ĉi malsukcesigis la japanajn dezirojn. Tiam Japanujo okupis Koreon kaj Manĉurion. En Koreo la tro severa klimato ne permesas al japanoj sendlangere restadi kaj en Manĉurio la Ĥinaj indigenoj laboras tiel malmulte koste, ke la pli civilizitaj japanaj laboristoj ne povas akcepti ilian konkurencon. Japanujo faris florantan landon el la iam duonsovaĝa Manĉurio sed nur la indigenoj profitas el tio ĉi. Hindujo kaj



Printempo en Oomoto-Sidejo, Ajabe, Japanujo

angla kaj de la japana ŝiparoj, la ambaŭ regnoj interŝanĝis amikajn telegramojn kaj la japanaj ĵurnaloj publikigis longajn raportojn pri Anglujo. La angla lingvo multe disvastiĝis en Japanujo kaj ĝis hodiaŭ ĝi estas la unua lingvo lernata post la gepatra. Sed la ekonomiaj interesoj de la du imperioj japana kaj angla multe diferencigas. La japana komerco en Ĥinujo kaj la evoluo de la japanaj maraj transportkompanioj kaŭzis multe da zorgo al la anglaj konkurantoj. Tiamaniere la angla-japana amikeco ne povis longe daŭri kaj Britujo ĉesigis la japanan aliancon dum la Washingtona konferenco, kie oni pli ol proporcie limigis la japanan ŝiparon. En la naŭva kaj tro lojala japana popolanimo kaŭzis tiu ĉi malamikego de la angloj veran ribelon. Ĝis

Sudafriko posedas severajn leĝojn por malhelpi flavan emigradon kaj tiamaniere japanoj povas nur elmigri al Sudameriko, kiu baldaŭ estos plenplena kaj sekve la elmigrada problemo ekpezos grave en la tutmonda ekvilibro.

Al la demografia problemo ni devas aldoni la ekonomiajn malavantaĝojn de Japanujo — lando industriiganta, kiu bezonas ĉiutage pli kaj pli da krudmaterialo, lando posedanta militistaron kaj ŝiparon, unuvorte imperio grandpotenca, kiu ĝuas nenian avantaĝon de sia grandeco. Nesufiĉeco de brulmaterialoj, kiel karbo kaj petrolo, malhelpas la progresadon de la industrio; nesufiĉeco de fruktorika tero malhelpas la vivadon de ĉiam plimultiĝanta loĝantaro. Tiu ĉi situacio estas la kaŭzo de la nuna imperialista politiko.

Al kiu direkto la japana politiko orientiĝos? La simplaj personoj emas kredi, ke al Ĥinujo. Tamen ni ne devas forgesi, ke el la malpacoj de la pasinteco kaj el la hodiaŭa sintenado de la japana registaro, la ĥina popolo ne facile kredus al la sincereco de japana amikeco. Malgraŭ ke japanoj kaj ĥinoj povas skribi facile interkompreniĝi kaj ke ilia kulturo estas komune azia, estas profundaj diferencoj en la karaktero de la du popoloj kaj ankaŭ en iliaj ekonomiaj interesoj kaj kulturstatoj.

La socialismo ludas ankaŭ gravan rolon en la politika orientiĝo de Japanujo. Kun la progreso de la industrio la nombro de la uzina proletario pligrandiĝas kaj la laboristaj organizajoj plifortiĝas. La regantoj de Japanujo prave timas do la bolŝevisman, sciante, ke tiu ĉi socia malsano disvastiĝas prefere en la novaj industriaj landoj kun forta terkulturo. Kaj ĉar nuntempe oni ne ankoraŭ certe scias, kiel fortaj estas la rilatoj inter Ĥinujo kaj Sovetlando, tial la konservativa japana registaro sendube estos tre singarda rilate al

ĥina orientiĝo. La talenta franca ĵurnalisto Jules Sauerwein, kiu antaŭ nelonge vojaĝadis en Japanujo kaj publikigis interesan enketon en la pariza ĵurnalo «*Matin*», rimarkas, ke se malantaŭ Ĥinujo ne troviĝus Moskvo, Japanujo jam delonge estus flanke de Ĥinujo.

Malfidata de Azio kaj ĵaluzata de la grandpotencoj anglolingvaj, Japanujo kompreneble serĉas aliajn aliancojn. Francujo ŝajnas en la lasta tempo alproksimiĝi al Japanujo. Aliparte Germanujo, kiu estis senigata de siaj kolonioj; serĉas novajn koloniajn amikojn por la plifortiĝo de sia potenca transmara komerco. Tiamaniere japanaj politikistoj ĝojas pri franca-germana interproksimiĝo, ĉar ili esperas iam krei aliancon inter Japanujo, Francujo kaj Germanujo, kiu garantius la pacon de la mondo, formante la kontraŭpezon al la angla-amerika bloko. Sed tiu ĉi plano estas ankoraŭ malproksima de la realiĝo kaj provizore oni povas diri, ke la situacio de Japanujo ne estas en ekvilibro. Kien Japanujo iras, estas unu el la plej enigaj demandoj de nia epoko.

JOHANO VIOLULO.



Foto Oomoto  
Esperanta propaganda halo en la Pariza Foiro

## Conan Doyle pri psika esplorado

*Oni anoncas el Worcester (Mass., Usono):*

«*Psika esplorado plej verŝajne unuigos sciencojn kaj religion kaj kaŭzos grandiozan progreson en la marŝado de la homaro al la nekonataĵoj de la naturo*». — Tiu ĉi estas la devizo, kiun proklamis Conan Doyle en sia parolado farita en la Clark-Universitato.

La fama aŭtoro pritraktis en sia parolado la antagonismon de materialista scienco kaj spiritualismo. Li pruvis, ke la dogmo pri la neekzisto de animo, en la scienco, malprogresigas la homaron. Li konfesis, ke multaj malhonestaĵoj okazis en spiritistaj rondoj kaj ankaŭ, ke multaj el la spiritistoj ne estas sufiĉe inteligentaj, sed li aliparte laŭdis la belegajn rezultatojn akiritajn de kelkaj spiritualistoj.

Li speciale parolis pri la *ektoplasmo*. Tiu ĉi stranga substanco korespondas ekzakte al plastikaj materialoj devenantaj de vaporo, kaj estas identa al la substanco, kiun jam supozis la unuaj spiritistoj kiel materialan bazon de la spiritfenomenoj.

Konkludante, Conan Doyle konfesis, ke li ne kredas ke la eksperimenta psika scienco kontentigas la koron de la homoj, kiu estas esence religia. La ĉefa celo — li daŭrigis — estas havigi al seriozaj materialoj de nia dubema epoko, metodojn, kiu donos ekzaktajn informojn pri niaj devoj kaj destino. *Tio ĉi povas esti atingata per kontakto kun superaj spiritoj, kiuj elkondukos nin el la marĉo de la anarkio.*

Conan Doyle, la konata spiritualisto, citis kelkajn famajn scienculojn kiuj, kontrolinte spiritajn fenomenojn, trovis, ke ili estas firmaj faktoj. Inter tiuj sciencistoj, ni citu: S-rojn Oliver Lodge, Russell Wallace, darvinisto, Lombroso, fama alienisto, k. c.

## La Reveno de Kristo al Jerusalemo

(de Majstro O. DEGUĈI)

(13) El la *Rakontoj de Spirita Mondo*

### XI

#### INDIGNO

(1640-a ĉapitro de la *Rakontoj de la Spirita Mondo*)

Sur la Monto de Olivarboj, kies folioj moviĝas en la facila vento, tri araboj starantaj interparolis pri diversaj aferoj de la mondo. De la valo de Kidolon, blankaj nuboj, kiuj similas fumajon, kolektiĝis kaj malrapide sed konstante venadis supren al tiu-ĉi loko. La bazo de la Ciona Universitato, kiun la judoj planis, jam estis preskaŭ finkonstruita. Kelkaj dekoj da lignohakistoj, ĉarpentistoj kaj similaj laboristoj aktive okupiĝis. La tri araboj interparolantaj nomiĝas Tek, Tonk kaj Turo.

**Tek:** Aŭskultu! Ni servas al Dio ĉiutage matene kaj vespere, tute fidele kiel ortodoksaj mahometanoj kaj tamen ni devas labori simile al kameloj por malmulte da salajro sub komando de herezuloj. Tio ja ne estas tre saĝa afero! Finfine la judoj reprenis la landon de Palestino kaj ili sintenadas, kvazaŭ tiu-ĉi sankta loko apartenus nur al ili mem. Nin, arabojn, ili kruele ekspluatas kiel sklavojn. Malgraŭ ke ni laboras same, judoj pagas al ni nur 1/2 dolaron dum ili gajnas 1 dolaron potage. Kaj pro tio mi ne volas rezigni rilate al niaj naciecaj rajtoj.

**Turo:** Jam neniu povas nin helpi. En nia epoko la potenculoj estas potencaj kaj malpo-

tenculoj estas malpotencaj. La judoj suferadis dum 2600 jaroj ĝis hodiaŭ, kiel senpatruja popolo. Ni do povas lasi ilin nunne iomete fieri, ĉu ne, Tonk?

**Tonk:** Ili pensis pri la unuigo de la mondo kaj nun tempo venis por ili reposedi Palestinon, la de Dio elektitan landon kaj tial ili estas nun regantoj de la mondo. Oni diras, ke estas preferinde, ĝentile obei al la fortuloj kaj tial ni devas kontentiĝi, se ni deziras vivi en sendaĝereco. Estas jam tre bone, ke ni ricevas almenaŭ duonon de ilia salajro. Se ni ne vivas lukse, tamen ni povas subteni nian vivon. Ne estu do malkontentaj! Kiam oni vivas kun dankema koro en ĉiuj aferoj, nia vivo estas tute bela, vivinda. Se ni konsideras, ke ni estas laborantaj por Dio, la malalteco de salajro kaj sociaj diferencoj ne multe gravas. Grava afero por ortodoksa mahometano estas toleri.

**Tek:** Ĉiuokaze mi estas netolereme malkontenta. Mi ne plendas por bagatelajoj, kiuj koncernas mian solan vivon, sed mi protestas por la tuta araba gento, pro tiu-ĉi distinga traktado. Plendo havas diversajn nuancojn: ni devas fari diferencan inter plendo pro si mem kaj plendo por la publiko. La mia estas plendo por la publiko.

**Turo:** Eĉ se via plendo estas por la publiko, ĝi povas havi nenian efikon, eĉ ni mem ne indigniĝas kaj ne nervemiĝas pro viaj instigaj vortoj. Vidu, Tek, mi ne emas fari viglan paroladon por la araba gento. Ĉio havas sian tempon.

**Tek:** Vi estas tia homo kaj pro tio vi devas ĉiam servi kvazaŭ kamelpelanto. Homoj, kiuj ne zorgas por la publiko, jam ne povas esti kvalifikataj kiel homoj.

**Turo:** Fi! Via plendo ne estas por la publiko, ĉu ne, kamaradoj? Efektive via plendo okazis nur pro manko de duon-dolaro. Se vi uzus la vorton «*publiko*» en tia senclo, la vorto mem kolerus! Nu, la publika plendo estas malkaŭso de fervoro, kiam oni ne povas efektiviĝi sian opinion por la socio, grupo aŭ ŝtato. Tia plendo okazas pro la grandaj problemoj de la socio, kaj tial ĝi devas havi humoron tre ĝojigan, interesan kaj vivecan. Sed kiam iuj aferoj ne kontentigas niajn dezirojn, tiam ni plendas por ni mem. Tia plendo kompreneble ne estas publika. Se vi parolos tiajn virinecajn aferojn, tiam judoj vin malhonorige traktos. Publika plendo estas ekzemple, kiam oni tre forte zorgas pri la ŝtato aŭ publiko kaj la publiko aŭ ŝtato ne akceptas la opinion de la plendanto; tiam la plendanto ne povas toleri kaj pro troa doloro oni eĉ memmortiĝas. Aŭ por la socio oni devas labori inteligente kaj oni eĉ devas suferi por ĝi, malgraŭ la moko kaj ridoj. La moko nin instigas je plia perfektigo, kio ja estas la fundamento de ĉiu socia agado. Jen estas la karaktero de la plendo por la publiko kaj sekve estas veraj kaj interesaj nur tiaj plendoj. La sekvantaj plendoj kontraŭe estas ne publikaj: Ekzemple, ĉar la edzino ne amas sian edzon por la malfavoro de la providenco pri la edziĝo, la edzo foriras el sia hejmo pro forgesi sian malkontentecon pere de alkoholaĵoj aŭ virino, aŭ li forjetas telerojn kaj tasojn, ĉar la vespermanĝo ne estas tiel bona, kiel li tion dezirus, aŭ forgesante sian propran maldiligentecon, tia homo estas malkontenta pro ĵaluzo de ies plia salajro kaj tial li plendaĉas. Alifioje edzino aĉetas amanton pro malmoraleco de la edzo kaj aliflanke la edzo aĉetas amatinon. Kelkaj per-

# METAPSIKO

RIMARKO. — *Ni proponas sekvantajn vortojn:*

**Metapsiko.** — Nova scienco, bazita sur indukta kaj eksperimenta metodo, kaj esploranta la fenomenojn de la ekstrakordinaraj psikaj statoj.

**Tranco.** — Speco de svena stato en kiun falas la mediumoj.

**Teleplasma.** — Spiritua substanco, kiu povas pli malpli dense materiigi kaj fariĝi sentebla por la kvin sentiloj.

**Telekinetiko.** — Okazigo de mekanikaj efektoj sur la materio traus la spaco.

En diversaj landoj, la universitata mondo, interesigas pli kaj pli pri la « normalaj » psikaj fenomenoj kaj konvinkigas ke ili ne estas iluzioj. Unu el la plej eminentaj natursciencistoj en Anglujo, Dr. Tillyard, membro de la reĝa societo de Londono, ĵus publikigis verkon, kie li priskribas siajn unuajn *Personajn eksperimentojn* faritajn kun amerikana mediumo, samkiel siajn pripensojn pri: *Interpretado de la psikaj fenomenoj.*

Vojaĝinte en Usono, li ĉeestis la eksperimentajn kunsidojn kun la fama mediumo « Margery » edzino de Dr. Le Roi Crandon, de Boston, kaj li restis kun impresoj, ke li vidis aŭtentikajn fenomenojn. Ĉiuj garantioj por kontrolo estis donitaj al li. Margery okazigis unue fenomenojn de « sendependa voĉo » dum kiuj fremda voĉo sin aŭdigas en parto de la ĉambro kie neniu estas. Por forigi la hipotezon de ventroparolado, la mediumo alĝustigas siajn lipojn al lerte eltrovita hidrostatika aparato (tubo), kaj subtenas akvan kolonon ĉe definita alteco.

Aliparte, la buŝoj de la aliaj ĉeestantoj estis kovritaj per la manoj de Dr. Tillyard kaj de lia edzino. En tiaj kondiĉoj voĉo aŭdiĝis kelkfoje, kaj respondis al diversaj demandoj donitaj al ĝi.

Dua eksperimento. Dr. Tillyard metis en korbon kelkajn objektojn, inter aliaj skulptitajn figurojn, entomologiajn pinĉilojn, kaj broĉon de sia edzino. **Tiuj objektoj estis perfekte rekonitaj en malmulto** kaj detale priskribitaj de « Walter » dua personeco de Margery. La korbo estis levita kaj portita tra la ĉambro. Por tiu eksperimento, fosforeska papero

estis fiksita per pingloj sur la korbo. Rimarkinde estas, ke la mediumo havis la brakojn kaj piedojn litigitajn per la kurtena ŝnuro, tiel ke oni estis devigata tranci la nodojn por sin liberigi, post la eksperimento.

Margery povis egale agi trans distanco sur unu telero de pesilo, dum la alia estis ŝarĝita. Tiu ĉi eksperimento kiu estis ripetita kelkfoje, okazis en ruĝa lumo, kaj Dr. Tillyard povis movigi sian manon en ĉiuj direktoj ĉirkaŭ la pesilo por konstati, ke nenio ajn artifikaĵo intervenas por movigi la teleron. Post la eksperimento oni dismuntis la pesilon, kaj oni konstatis ke ĝi estis tute normala. Oni faris fotografiaĵojn de tiu fenomeno per lumo magnezia kaj ultra-viola. La dua klišaĵo montras sub la malplena pesiltelero teleplasma materion. Dr. Tillyard povis vidi kaj tuŝi tiun teleplasmaon. Li priskribas ĝin kiel amaso maldensa kaj jomete brila, simila al la blanka parto de kuiritaj florbrasiko en blanka saŭco, aŭ ankoraŭ pli ĝuste, simila al kuiritaj safa cerbajo. Je tuŝado, tiu substanco donas impreson de granda elasteco, kaj kiel vivanta organo ĝi rezistas al la premo, sed ĝi tute ne similas al historio alia ol tiu de cerbo. Ĝi formiĝis subite proksime de la orelo, ne de la mediuma manoj, sed de unu el la ĉeestantoj, Dr. Hardwicke, kiu falis en tranco dum la kunsido. Poste, la loko kie vidiĝis la fenomeno estis ruĝa kaj tre doloriga. Obeante la inviton, la teleplasma prenis la formon de vivanta mano, kiu sin trempis en vazon plenigitan de fandita vakso kaj tiamaniere donis perfekte stampitan modelilon. Tio ĉi estis dekstra vira mano, sed pli malgranda ol tiu de Hardwicke, do tute malsama; ĝi prezentis kelkajn similecojn kun tiu de Dr. Tillyard mem. Inter la fenomenoj observitaj oni devas citi la diversajn brilajn punktojn kaj la lumajn moviĝantajn nubajojn, kiuj formis pli-malpli densajn senteblejn substancojn.

La kontraŭdiro, kiu defendas, ke la scienculoj povas esti pli facile trompitaj ol aliaj personoj, ne povas valori senfine. Fizikisto kiel Dr. Christian Winther, profesoro ĉe la Universitato de Copenhago, ĵus konstatis en plena lumo, kun F-ino Anna Ras-

mussen, agadojn telekinetikajn sur pendolo enfermita en ligna skatolo. La movoj (luloj) de tiu pendolo estis registritaj sur fotografa tamburo. La mediumo troviĝis malproksime je 3 m. 75 de la aparato. El 48 invitoj aĝi sur la pendolo, 42 sukcesis en la preciza momento, kiel oni konstatis post la rivelado de la fotogramo.

El *Mercure de France.* Trad. Jo Lo.  
(Daŭrigota.)

## ENKETO

*La redakcio de Oomoto Internacia organizas enketon pri la rilatoj inter la eŭropaj kaj aziaj popoloj. La legantoj bonvolu respondi al la jenaj demandoj:*

1. *Kion vi opinias pri la paneŭropa movado?*
2. *Kion vi pensas pri la panazia movado?*
3. *Ĉu kunlaborado intelekta, politika kaj ekonomia inter Eŭropo kaj Azio estas ebla, dezirinda kaj utila: se jes, kiamaniere ĝi estas neĉi facile kaj racie efektivebla?*

*La plej interesajn respondojn ni publikigos sinsekve en Oomoto Internacia.*

## VIZITU LA BELAN AŬSTRUJON!

La Aŭstra Esperanto-vojaĝa komitato aranĝas karavanojn unu po monato, kun esperante parolantaj fremdulgvidantoj, kiuj gvidos tiajn karavanojn de 25-30 personoj tra la plej belaj pejzaĝoj de la tuta Aŭstrujo. Ĉiu ekskurso daŭros 13 tagojn kaj kostos entute 375 aŭstr. ŝilingojn. La unua estis intencita por la 1. VI. 27. Sekvantaj vojaĝoj okazos la 10. VII., 7. VIII., 4. IX. 1927.

Interesiĝantoj, bonvolu tuj skribi al la adreso:

*Aŭstra Esperanto-vojaĝa komitato ĉe « Wikug » Wien 1. Hofburg, Batthyanyi-Strasse, 11. Stock, Aŭstrujo.*

sonoj, mokataj de la publiko kaj ne povantaj plendi ekstere, tion faras revenante hejmen: ili batas sian edzinon kaj rompas la fenestrojn. Tiaj plendoj ĉiam rezultas el propra malkontenteco. Se vi volas vere kolekti, kolektu intense! Kiam vi murmuris per malfortaj, mizeraj voĉoj, via plendo estas senfika kaj similas al plorado. Tia ago estas malnobla kaj sklavula. Ĉar mi bone komprenas la spiriton de nia tempo, mi toleras dum iom da periodo. Efective, kiam la Savanto revenos el Hinode Lando, li donos egalan rajton al ĉiuj rasoj kaj klasoj kaj eĉ al ni. Li donos pacon kaj trunkvilecon.

**Tek:** Ĉu tio vere okazos? De niaj prapatroj ni kredis la revenon de Kristo, laŭ la Biblio kaj atendadis Lin en tiu-ĉi sankta loko ĝis la maljuneco. Kial do Dio ne ekkolerigas por la publiko pro la malboneco de nia mondo, kaj kial Li ne rapide starigas mondon de amo kaj de egalrajteco? Jen kial mi kaŝeme plendas por la publiko.

**Tonk:** Aahahahah...

**Turo:** Kasema plendo estas iom stranga. Dia plendo estas tia, kiu faras uraganon, superakvejon kaj pluvejon. La plendo de la Tero okazigas tertremojn, radikale transformas kreskajojn, montojn kaj riverojn kaj tial ĝi faras grandan purigon. Tia estas la publika plendo de la ĉielo... kaj ankaŭ de la Tero. Granda estas la diferenco inter tia plendo kaj la via. Eĉ se vi rompas unu kvadraton de fenestra vitro, tio preskaŭ nenion helpas al la plibonigado de la mondo.

**Tek:** Kaj kion vi opinias pri la Ciona Universitato, kiun ni konstruas? Denove la judoj ekhavas pli da forto kaj ilia Universitato estos ilo por subpremi nin, arabojn. Ĉu vi ne

pensas tiel? Se tia estas la afero, ni ne povus labori tie-ĉi eĉ duontagon pli, ĉar tion al ni postulas la honoro kaj la justeco. Justeco pli valoras eĉ ol sato.

**Turo:** Tiu ĉi Universitato servos por la solidigo de la fundamento de la Dia Regado. Oni venigos tien ĉi la grandajn klerulojn de la mondo. Tiu-ĉi lando de Ciono estas spirita regno, kiu troviĝas ĝuste sub la zenito de la ĉielo kaj ĝi similas la ĝustigilon de poŝhorloĝo. Tiu ĉi loko plej taŭgas por la gvidado de la tuta mondo kaj tial ni ne maltrankviliĝu. Venos la tempo, kiam ni ĉiuj havos egalajn rajtojn kaj estos egale favorataj. Ni estu do toleremaj! Ĉu Mahometanismo, ĉu Kristanismo, ĉu Judismo — ili ĉiuj enhavas bonajn flankojn, tamen ili suspektas unu la alian. El tio rezultas ĝuste la plendoj. La vera Dio estas unu-sola; ne plendu al la homoj, ĉar ĉio ekzistas laŭ la Dia volo.

**Tek:** Sed tamen, judoj estas tro fieraj, ĉu ne? Tion ni ne povas toleri kaj tial ni plendas.

**Turo:** Inter judoj estas diversaj homoj. Tiuj, kiuj fiere kolektiĝas, estas malgravaĵoj personoj. Fierigaĵo nur tial malnoblaĵoj homoj, kiuj estas en la samaj cirkonstancoj kiel ni. Kaj tial estas malsaga afero plendi, konsiderante ilin kiel gravajn personojn. La reveno de Kristo jam estas proksima kaj vi ne devas esti tiel malgrandanimaj. Kreu en vi mem vastan kaj liberan kaj ĉioenhavan koron, kiel la universo estas. Se ne, vi malhonorigas la tutan araban genton. Ni ja estas nun en la centro de la mondo, sur la sankta monto de Olivarbo; kial do vi plendas? Ĉu ne, Tonk?

**Tonk:** Jes, vi estas prava. La pensmaniero estas tre grava por homo; ni laboristoj estu kiel laboristoj. Eĉ se ni volus imiti la vivma-

nieron de la sinjoroj, tio ne estus por ni ebla. Sinjoroj estis iam ankaŭ laboristoj kiel ni, la sola diferenco estas, ke ili laboris aŭ laboras intelekte, dum ni laboras korpe. Ni ankaŭ povas niavice dungi judojn, kiam ni estos sufiĉe riĉaj.

**Tek:** Mi malŝatas la tielnomatajn sinjorojn. Efective, en la nuna tempo nenio troviĝas sinjoroj en la vera senco de la vorto. Ili ĉiuj estas egoistoj. Kiam mi rigardas la vizaĝojn de tiaj sinjoroj, kiuj gvidas hipokritan vivon, mi tuj ŝatus ilin pugnohati. Jen estas iliaj devizoj: 1-e bele vestiĝi, 2-e loĝi en grandaj domoj, 3-e posedi plurajn vilanojn, 4-e subteni kromedzinojn, 5-e ofte amuziĝi per ekskursoj, 6-e malŝati ĉian laboron (ili ne emas eĉ verŝi teon), 7-e plurfaje po tago ĉeesti festojn, babili kaj kun virinoj, drinki kaj manĝegi. Jen estas ilia tuta vivo. Kie estas do la vera valoro de la sinjoroj?

**Turo:** Via sinjoro estas tute alia ol la mia; li estas tia: 1-e li havas noblan karakteron, 2-e estas riĉa je amo kaj filantropiemo, 3-e li estas etiketema, 4-e li forĵetas sian politikan ambicion kaj ofertas sian riĉaĵon por la bono de la socio, 5-e li observas la leĝon de monogamio, 6-e li disponigas plurajn domojn por la libera uzado de malriĉuloj tute senpage, 7-e li kredis Dion kaj kondukas harmonian familian vivon kaj ĉion konfidas al Dio. Tia estas mia sinjoro.

**Tonk:** Ĉu eĉ unu tia sinjoro troviĝas en la nuna mondo?

**Turo:** Ne estas, kaj ĝuste tial la valoro estas des pli granda. Se diamanto aŭ oro troviĝas en la mondo tiel multe kiel la sablo de la Jordano, neniu konsiderus ilin kiel valorajojn. Ili valoras ĝuste, ĉar ili estas malfortaĵoj. La suno estas unu sola kaj tial oni preskaŭ

### Gvidprincipoj de la Novspiritmovado en Germanujo

#### Vivmaksimoj por Novspirituloj

1. — Interne ni homoj estas disŝiritaj kaj sklavoj de la aferoj materiaj. La plej simplaj leĝoj de la *homeco* pli ol iam antaŭe estas piedpremitaj. — *Tute nova spirito* devas trapenetri nin kaj aliĝi nian vivon, se ni volas ke *harmonio kaj unueco* anstataŭ la nunan netaŭgan staton, se, el malhelo kaj haoso, el disŝirado kaj disigado ni deziras veni al interna kaj ekstera, psika kaj korpa saneco, al novigo de nia vivo, al heleco, al *liberiganta unueco*.
2. — *Novspirito estas la nova spirita movado*, kiu, elirante el la *principo de unueco*, volas konduki nin al praktika solvo de la eksteraj problemoj per plej supera *amo* kaj per *faktiĝinta fratento*; ĝi montras al ni la *vojon*, por forigi ĉiujn homajn, politikajn mizerojn de la nuntempo per la *instruo kaj praktiko de la « internigado »* kaj *« spiritiĝado »*.
3. — *Ĉefcelo de la Novspirito* neniam estas nek estos la starigo de instruoj kaj dogmoj, sed *ŝanĝado de ĉiuj niaj animoj de pensado en faktecojn*.
4. — Nur per *praktikado* evidentigos la valoro de *novspiritaj fundamentkonceptoj*. *Novspirito* provas, per progresantaj klarigadoj kaj *ekzercadoj* de modelaj ekzemploj, ke *ĵustan pensadon sekvas ĵusta agado*, kaj ke ĉiu mizero aŭ malfeliĉo estas *sekvado de malfajta pensado*.
5. — En ĉiu vivaĵo, en ĉiu atomo de l' tuta naturo ekikas *Dia fajro*. Ekzistas neniu kreitaĵo sen Dia forto. En ĝi ni formas nun ĉio, kio vivas, uediisgeblan unuecon. Tio estas centra *novspirita koncepto*, kiu interligas homon kun homo kaj mikrokozmon kun makrokosmo.
6. — Tasko de la *Novspiritmovado* kaj devo de ĉiu homo, kiu interne travivis la *grandan miraklon de la unueco kun la en li brulanta Dia fajro*, estas, montri al kiel eble plej multaj el liaj kunfratoj la vojon al la vekigo de tiu-ĉi plej alta Ego (« Mio »), al sentado kaj travivado de la en ĉiu homo

estantaj kosmaj fortoj kaj al akirado de la konscio, ke ni laŭ nia vera esenco estas *Diaj*.

7. — En ĉiuj landoj, en ĉiuj eĉ tre malgrandaj vilaĝoj kaj urboj ekzistu *novspiritaj komunumoj* aŭ cirkloj, kies celo estas, fariĝi *lumcentroj, spiritaj akumulatoroj kaj fontoj*, kiuj reciproke estas interligitaj, *tiamaniere ĉirkaŭante la tutan terglobon per reto de nekontraŭstarebla spirita lumforto*.
8. — *Novspirito estas la instruo de la spirita unueco de ĉio, kio ekzistas* (filozofie: *spiritualisma monismo; praktike: pozitiv-optimismo idealismo!*)
9. — *La Spirito estas la Unua: ĝi trapenetas ĉion*. Ĝia materio subigas al la leĝoj de la spirito.
10. — *Novspirito* volas esplori la leĝojn de la makrokosmo (la universo), kaj de la mikrokosmo (la homo). Nur se ni formas nian vivon laŭ tiuj-ĉi leĝoj kaj *praktike uzebligas* nian ekoncon en nia ĉiutaga vivo, nur tiam ni sukcesos *ĵuste pensi kaj ĵuste agi* ankaŭ en la plej malfacilaj vivkondiĉoj, en la plej granda haoso.
11. — *Celo de ĉiu Novspiritpraktikado* kun ĝiaj *silentad- kaj koncentradekzercoj* estas la ekvekigado kaj majstrado de la *spiritaj energioj en ni*. *Novspirito* instruas kaj disvolvas la arton, majstri nian vivon hejpe de *ekzercataj pensfortoj*.
12. — *Pensmajstrado estas vivmajstrado*; la ŝlosilo por saneco, feliĉo kaj interna paco estas *harmonia pensado*. Ĉiu homo posedas interne tiujn potencajn energiojn de la *pensforto kaj kredopoteŭco*, per kies uzado li povas saniĝi de ĉiu sufero kaj malsaneco, sin liberigi de ĉiu mizero kaj *majstri sian vivon* en vera senco de la vorto.

(Daŭrigota.)

## LETEKESTO

Ni ricevis la abonkotizojn de S-roj Rud. Burkert, Niemes, Ĉeĥoslovakujo, por 5 abonantoj; Fr. H. Gnehm, Bern, Svisujo; Ant. Kudlja-Olomouc, 150 ĉ. kr.; C. C. Trouw, Aboude, Germanujo, por la germ. brosur. Al ĉiuj koran danon!  
O. B. en Köln-Zolstock. — O. I. sendita al vi. K. Eckst. München. — Ni korektis vian adreson.

**Tonk:** Aŭskultu, ni ne havas hodiaŭ liberempon, sed tamen ni tie-ĉi sub la arboj ripozas. Ni strikas kaj tial mi ne povas plendi dirante, ke judoj donas al ni malpli da salajro. La rezultato de la laboro de la diligentaj judoj estas pli ol duobla kaj tial vi ne povas plendi nur pro la malalta salajro. Ni laboru nun! Se la inspektoro kaptus nin, tio estus grava afero.

**Tek:** Ah! ah! Tio ne estas kontraŭstarebla: nur pro la deziro manĝi.

Preninte sian fosilon, Tek foriris al la konstruejo vole-nevole. Jam krepuskiĝas kaj la trumpeto, kiu signalas la finon de la laboro, eksonas sur la monto. La tri viroj mestis siajn fosilojn sur la ŝultrojn kaj rapide malsupreniras la deklivon, plenan de ŝtonetoj. Ili ĝojas pro la fino de la laboro. Multaj ĉarpentistoj kaj aliaj laboristoj hejmeniras nun en vico, kiel formikoj: ili loĝas ĉiuj en la urbo Jerusalemo. La plimulto estas judoj. Jen venas viro kun longa bastono, li estas *Vravasa*, propagandisto de Rutbahaismo, veninte el Hinode Lando, kiel heroldo de la reveninta Kristo. Staranta sur la plej pitoreska loko de la monto, li rigardas la lunon oktagan kaj kantas:

« Mi rigardas la lunon, kiu jas pasis tra la zenito, ĉirkaŭate de senombraj, brilaj steloj. Ĉar tiu-ĉi estas malofte bela lunluma nokto, mi ne povis toleri resti hejme kaj venis ekstere ».

Rigardante malsupre la stratojn de Jerusalemo, *Vravasa* pensas pri sia hejmo en Hinode Lando. Subite ombro proksimiĝas al li; kia ĝi povas esti?

(Diktita je la 12-a de Julio 1923.)

O. DEGUĈI.

## BIBLIOGRAFIO

En tiu ĉi rubriko ni konciĝe raportas pri ĉiuj al ni po duekemplere senditaj libroj. Verkoj en aliaj lingvoj estas ankaŭ akceptataj.

*La Verda Mondo*. Artikolo: « La de Dio kreita lingvo », kie ni legas: « Esperanto estas kreita per la inspiro de Dio, kiu venis al la pola geniulo D-ro Zamenhof ».

*Die Weisse Fahne*. Interalic: « Konsilio kaj pensoj pri l' aŭtosugestio », de Emil Coué; « Simpatico — Sugestio », de Karl Kern; « Vortoj de Pestalozzi ».

*Nova Ekonomia Politiko*. Artikoloj: « Fiksa monunuo, libera mono kaj libera tero », de Fr. Schwarz; « Ĉu malantaŭen al komunismo aŭ antaŭen al liberekonomio? »

*L'Ordre Naturel*. Fondinto H. Follin; direktanto: Paul Bergeron, enhavas analizon de la libroj de H. Follin: « La Filozofio de l'Ekonomio antaŭ la Sociologio » kaj « La ekonomia solidareco aŭ solidarista ekonomio ».

Bulletin d'information de la République Supranationale.

*Cahiers du Semeur*. Publication mensuelle du groupe français du mouvement international de la réconciliation (monata organo de la franca grupo de l'internacia movado por reamikiĝo).

*Villemska Zvezda*. Organo de la bulgara societo por psikaj esploroj spiritologie. N-roj 19 kaj 20. Tradukadoj el la verkoj de S-ro O. Degučii.

*Bahaismo kaj Esperanto*. En persa lingvo kaj en Esperanto.

*La Vojo de Klerigo*. Monata pedagogia revuo; organo de la stata scienca metodologia komitato de la popola komisario por klerigo de l'Ukraina Socialistista Sovet-republiko. Enhavas esperantlingvan resumon de l'artikoloj.

*L'Echo des Amis*. Organo de la Kristana Societo de la Amikoj (kvakeroj).

*La Revue Spirite*. N-ro de majo dediĉita al la ĵus mortinta patriarĥo de la spiritismo, Léon Denis.

Specialan atenton meritas la maja numero de *La Suno Hispana*, kiu publikigas longan artikolon de S-ro A. Piñón, titolitan « Mia privata opinio ». Temas pri la nuna funkciado de U. E. A. kaj de ĝiaj apudaj organizaĵoj, kies membroj, anstataŭ kreski, malmultigi. Temas ankaŭ pri la financa kontrolo de tiuj ĉi organizaĵoj kaj pri la « aŭtonomio » de la naciaj esp.-asocioj, de kies laboro dependas la nombro de U. E. A.-anoj. Ekzistas multaj aliaj « pinglaj » demandoj pri kiuj oni atentigas Genevon...

Gazetoj kaj libroj ricevataj:

*Konkordo, La Movado, Esperanto U. E. A., Marto, Esperanto-Junularo, Senaciulo, La Lernanto, Esperanto en Nipponlando, Itala Esperanta Revuo* (bele ilustrita), *Germana Esperantisto, Esperanto-Praktiko, Kataluna Esperantisto, International Langage, Revista del Sleno, Svenska Esperanto-Tidningen, La Espero, Der Arbeiter-Esperantist, Ono de Daŭgava, Internacia Stenografisto, Le Corcejen, Munkaskultura, Mariaivana Espero, Juna Mariaivito, Der Freidenker, Der Freie Arbeiter, Proletarische Revolution, Proletarische Zeitgeist, Deutsche Kursive*;

*Die Sünde Wider das Tier* (La Kulpo kontraŭ la Besto), Biblioteko de Weisse Fahne; *La Karto Mistera*, eldono de Brita Esperanto-Asocio.

# Senpage

ni sendas al ĉiu petanto speciman numeron de nia semajna, grandformata, neutrala ĵurnalo

## Heroldo de Esperanto

Skribu al la Administracio en Horrem bei Köln (Germanujo)

Le Gérant: HENRI SELVES

Oomoto-Presejo Esperantista (V. Polgar), 33, rue Lacépède, Paris, Ve

adoras ĝin, dum neniu atentus pri la senombraj steloj.

**Tek:** Kion vi diras, Turo! Ni devas pensi pri nunaj ĉiutagaj sinjoroj. Ni devas konsideri la nunajn sinjorojn kaj ne la esceptojn. Tiuj homoj, kiuj nomigas sinjorojn, devas esti adonataj pere de la fondo de Universala Ligo de Laboristoj, por ke ili pliboniĝu. Konsiderante la kondiĉojn de la nunaj sinjoroj, ni vidas inter ili klasojn, laŭ la nombro de iliaj kromedzinoj, domoj kaj festoj, kiujn ili partoprenas. La nombro de iliaj konatulinjoj havas grandan rilaton al ilia influo. Jen estas la leĝo de la nunaj sinjoroj. Kiel malĵusta estas tiu-ĉi vidpunkto! La sano de la nunaj sinjoroj malpliboniĝas tagon post tago. Pripensu pri la kontentigo de seksa instinkto en ĉiuj lokoj kaj pri la malŝatindaj malsanoj, kiuj el ĝi rezultas. La spermo de la testiko pli kaj pli mortas kaj tio malplimombriĝas la idojn. Tiaj kaj aliaj multenombraj malmoralaj agoj konstante malfortigas la popolon, originale fortan. La edzinoj siaflanke freneze serĉas virojn por la kontentigo de siaj seksaj deziroj, ili foriras el la hejmo kaj pagas al viratoj. Nuntempe, preskaŭ neniu el edzinoj de tiaj sinjoroj estas ĉestaj, ili preskaŭ ĉiuj perdis la virinecan vertecon. Ambaŭ, sinjoro kaj sinjorino, suferas en la malvarma ĉambrego. Iliaj infanoj havas nature malfortan korpon, kapablas fari nenion por la bono de la mondo kaj baldaŭ pereas. Sed tamen, tio-ĉi estas jam destinata afero. La riĉuloj devas nun vekigi, ŝangante sian ĝisnunanan sintenadon kaj kunlabori kun siaj kunhomoj kaj kun la malriĉuloj, klopodante por la popolo. Se ne, ilia fino estas jam proksima. Ili ne estos la mondon senfine... Tiel deklarita Dio (en Oomoto verkoj).

